**STA001** **\$12.40**

**La vidvino kaj la profesoro.** *Ronald Cecil Gates.* A full-length original crime novel by the well-known Australian author. 1997. 132p. 230x150. Paper. Austria. Series "Original Literature" #23. ISBN 3-901752-06-4. NEW TO ELNA.

**VID001** **\$13.60**

**Vojaĝo en Esperanto-Lando.** *Boris Kolker.* "An advanced Esperanto course and guidebook to the Esperanto culture." This revised, expanded and enhanced second edition contains numerous short stories, poems and articles selected for interest as well as didactic value. Broken down into 26 "lessons", each with around half a dozen different items for reading and discussion. Each lesson is heavily annotated with explanatory notes by the author, and concludes with a series of questions for "practice of the language." Lots and lots of illustrations. 2002. 278p. 210x150. Paper. The Netherlands. ISBN 92 9017 078-6. NEW.

**VOJ005** **\$22.00**

---

The Central Office has, among other things that take up our valuable space, a stack of books sent by various Esperanto publishers as review copies. If you would like to undertake to review a book for *Esperanto USA*, please contact us and let us know. You can write to: **Esperanto USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530.** Or you can e-mail us at <eusa-reviews@esperanto-usa.org>. If agreement is reached for you to do a review, we'll send you a review copy of one of our books; once the review is finished, you get to keep the book.

We look forward to hearing from you!

## Practice speaking Esperanto from anywhere!

ELNA has a new teleconference service, which allows groups of people to carry on a conversation by telephone at no additional cost. Up to 30 people can link to the same conversation, and if more want to join, part of the group can split into another "conference room". The only cost is the normal price of a telephone call to Florida, where the server is located.

ELNA, through the volunteer help of Kent Jones, is organizing volunteers of experienced Esperanto speakers to be on the **telephone every Saturday and Wednesday at 7:00 p.m. Chicago time** (5:00 p.m. Pacific Daylight Time; 8:00 p.m. Eastern Daylight Time) at least for 10-15 minutes to greet other callers. All are welcome to participate! Beginners, this is your chance to practice real conversation, and to ask those burning questions about "si", "n", and which Esperanto dictionary is most recommended. If you're no longer a beginner, this is a good opportunity to brush up on your Esperanto, loosen up that rust, and enjoy a chat with international atmosphere. If you would like to volunteer to be one of those who welcome the callers, contact Kent Jones (773) 271-8673 or by email at <kentjones9@aol.com>.

To participate, just dial **(305) 503-6682** at the appointed time, and on the prompt choose **code 129**. You can do this any time, but it is much more interesting if there are others there at the same time. We have set up these two times every week (see above) when there will be someone there. If you wish to arrange other times with some friends, you are free to do so. Gajan babiladon!

-J.B.



**Kolker, Boris: *Vojaĝo en Esperanto-Lando*. 2a eldono reviziita kaj renovigita. Rotterdam: UEA, 2002. 278p. 210x150. Broŝurita. ISBN 92 9017 078-6. Ĉe ELNA: kodo VOJ005, prezo \$22.00 (\$19.80 por membroj de ELNA).**

- Mi vidis vian retpaĝaron, aĉetu mian lernolibron
- Sed mi jam havas tro da libroj, kaj ne bezonas lernolibron
- Sed vin interesus la mia, eĉ se vi estas sperta Esperantisto.

Tiel (nu, proksimume) komenciĝis mia kono de la libro *Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*. La aŭtoro kuiris tiun libron per nefuŝebla recepto: prenu tekstojn de la elstaraj aŭtoroj de Esperantujo (Zamenhof, Piron, Nemere, Baghy, Wells, Boulton, kaj multaj aliaj), miksu kun interesaj artikoloj de malpli konataj aŭtoroj, enverŝu grandan tason da esperanta kulturo, kunligu ĉion per historieto pri modela e-klubo, aldonu multajn fotojn, kaj

presu altkvalite sur altkvalita papero. La rezulto estas malpli "lernolibro" ol tuta biblioteko en unu volumo.

Kiam oni aŭdas la vorton "lernolibro", oni pensas pri frazoj kiel "tio estas plumo" kaj "kato estas besto", sed ĉi tiu estas "perfektiga kurso" kaj "gvidlibro." Laŭ propra priskribo, ĝi estas por personoj, kiuj volas regi Esperanton samnivele kiel la gepatran lingvon. Certe nur unu libro ne povas havigi tion al ni, sed kun la multaj tekstoj, ekzercoj, kaj temoj por diskuto, ĝi estas bona paŝo en tiu direkto.

Kvankam "lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni", mi mem ĉefe ŝatis tralegi la artikolojn. La pli sperta esperantisto rekonus multajn de aliaj fontoj, sed tio vere ne ĝenas, ĉar estas tiel multaj. La meznivelulo ankaŭ bone povus uzi tiun libron pro la multaj klarigoj kaj piednotoj. Vidante tiom da piednotoj en la unua artikolo ("Kiel naskiĝis Esperanto" de L. Zamenhof), mi tamen konfesas ke mi ekhavis kulposentojn, kiajn mi ne havis ekde kiam mi ĉesis esti fundamenta kristano. Ĉu korekti la skribaĵojn de Zamenhof? Blasfemo! Estis kvazaŭ oni aldonas banalaĵojn al io sakra! Bonŝance mi sukcesis trankviliĝi kaj daŭrigi la legadon, ĉar sendube indas.

La temoj kovras tutan gamon — sed plejparte ili traktas esperantistajn temojn. Por mia propra gusto, foje ŝajnis tro, kaj mi komencis senti ke la aŭtoroj estas iom blindigitaj de verdaj okulvitroj, sed tion oni atendu en "gvidlibro pri la esperanta kulturo." Certe multaj ja ŝatas tiajn artikolojn, kaj tiuj kiuj ne ŝatas sendube trovos multan legindan en la libro.

Ekzemple, la unua artikolo en leciono (ĉapitro) sep — "Songo Teruras, Songo Forkuras", satiraĵo de Cezaro Rosetti — estis ĝene kritikema al la prononcmalmaniero de angloj. (Ĉu ne sufiĉas la bonega tiutema ese de John Wells de la tria leciono?) Sekvas tion la konata (aŭ almenaŭ koninda) poemo de Julio Baghy "Estas Mi Esperantisto", sed post tio, kvazaŭ spiro de facila vento, venas la gema poemo de Raymond Schwartz "Esperantisto,

ekesto kaj malapero" kiu klarigas pri la fazoj de esperantisteco — de unua trovado de la lingvo, al entuziasmo, al novaj amikoj, al ... nu, vi devus legi la poemon.

Aparte taŭga estus uzi la libron kun grupo, grupe legante la artikolojn kaj tralabori la ekzercojn kaj diskuti la temojn. La artikoloj estas mallongaj (legeblaj dum kunveno), interesaj, kaj ĉiam diskutindaj. Kolker ĉerpis de ĉiaj tekstoj, kaj ne limigis sin nur al la fundamentaj. Eĉ se oni ne aprobas la formojn "oldino" por "oldulino" aŭ la sufikson *-esk-*, oni ja sciu pri ili. Ĉu mi menciis ke ĉiu ĉapitro havas demandojn kaj sugestojn por diskuto?

Menciindas ankaŭ la ese "Kaj Post La Kurso, Kion?" de Joachim Werdin, kiu havas multajn bonajn konsilojn por praktike uzi Esperanton. Per piednotoj Kolker aldonas eĉ pli da bonaj konsiloj.

Kaj la tekstoj kaj la fotoj kovras la tutan historion de la lingvo de la tre malnova, ĝis la plej aktuala. La kovrila foto ekzemple estas verŝajne de la 86a UK en Zagrebo. Estas vere refreŝige havi tiel ĝisdatigitan libron en Esperanto. Mi scivolas tamen, ĉu libro povas esti tiel akurata, ke ĝi rapide malaktualiĝos. Ekzemple, la klubanoj en la libro diskutas la nunan translokiĝon de la Nord-Amerika Somer-Kursaro (de NASK.) Kiel aspektos tiu diskuto post kvin aŭ dek jaroj? Nu ni vidu.

Kelkaj temoj neniam malaktualiĝos. Kiel patro mi ŝatis "Terura novaĵo" de Claude Piron, kaj kiel viro mi ŝatis "Soleco" de Emilija Lapenna. La unua esploras la emociojn de la devo informi la gefilojn ke iliaj gepatroj disiĝos.

La dua esploras diversajn manierojn esti soleca de virina vidpunkto.

Mi finos per la jena konsilo. Se vi aĉetos nur unu Esperantlingvan libron ĉi-jare, aĉetu ĉi tiun. Ĝi ja estas kvazaŭ biblioteko en unu volumo. Se vi aĉetos multajn librojn ĉi-jare, aĉetu de la aŭtoroj de kiuj Kolker ĉerpis, kaj poste aĉetu ekzempleron de *Vojaĝo en Esperanto-Lando* por doni al amiko.

— Thomas Alexander





**Salt, Betty: *Lito apud la fenestro*. Rotterdam: UEA, 1999. 108p. 210x150. Broŝurita. ISBN 92-9017-068-9. Ĉe ELNA: kodo LIT002, prezo \$6.10 (\$5.49 por membroj de ELNA).**

Ĉi tiu verko de konata, kanada, multjara Esperantisto Betty Salt komenciĝis per rakonto nomita simile al la libro mem. Ĝi parolas pri kriplaj malsanuloj en hospitalo. Ĉi tiu ses-alinea rakonto diras, ke unu el ili, kiu havas liton apud la fenestro, diras anekdotojn al la alia pri la homoj, kiujn li vidas

trans la fenestro. Tial, la alia volas la vidon trans la fenestro. Kiam la rakontanto koratakiĝas, la envianto puŝas la medikamenton sur la plankon por ke la rakontanto mortu. Kiam la mortiganto ricevas la enviatan lokon, li malkovras, ke li povas vidi nur grizan muron trans la fenestro, ne homojn.

Ĉi-maniere enkondukiĝas ĉi tiu aro da anekdotoj, poemoj, teatraĵoj kaj tradukoj. La rakontoj pli similas anekdotojn aŭ fabelojn. Salt ne donis detalojn pri la karakteroj, aŭ pri la scenoj. La leganto ne ekkonas la agantojn en ili. La intereso venas de la surpriza finiĝo aux de humuro. Ĉiu rakonto diriĝas kun simpla lingvaĵo kaj simpla sintakso, kaj havas unu simplan ideon. Fakte, epitomigi unu el ili ŝtelus iom el iu ajn plezuro, kiun oni povus ĉerpi legante, ĉar la ideo estis jam malkovrita.

Neniu el la rakontoj temas aparte serioze. Ili temas pri la naivo de infanoj, miraj koincidoj, urbaj legendoj kaj strangaj agadoj de ordinaraj homoj. Ekzemple, unu rakonto konsistas el ses mallongegaj ekzemploj de "Supersensa Percepto," principe antaŭvido. En tiu, la tuta afero estas ke oni vidas aŭ sonĝas pri okazo, post kiam la samo okazas vere. Ankaŭ, Salt donis unu "rakonton" kiu konsistas en dekdu "Veraj rakontoj de Instruistoj," kompreneble pri infanoj. Kiel ĉiam en tia anekdoto, la infanoj miskomprenas iujn vortojn, malbonagas supoze komike, kaj montras la prenkreskulojn

esti malpli senkulpaj ol la infanoj.

Post ĉi tiuj malpostulemaj, malprentendaj aĵoj oni trovas ses teatraĵetojn. Ili uzas la saman stilon kiel la antaŭaj rakontaj. "Merkurio kaj la Arbohakisto" alportmentas kutiman aparatintrigon de ferakontoj. La bonaganto ricevas miran rekompencan, sed kiam la malafabla frato klopodas akiri la samon, li perdas iom da tio, kiun li jam havas, pro lia malbonkoro. Ĉiu el la teatraĵetoj povus esti rolata sur scenejo dum malpli ol kvin minutoj.

Ŝajnas, ke la poemoj estas la plej seriozaj verkoj en la libro. En unu el ili, Salt diras "se volas iu homo morti, certe estas mi". En "Releviĝo", ŝi parolas pri viro, kiu zorgas pri diversaj mondaj aferoj, kiel impostoj kaj "l' mizer' de l' Tria Mondo." En "Homo Sapiens", ŝi sekvas la progreson de homoj, kaj preĝas por "rajto al nom' Homo ja sapiens".

La fina parto de la libro konsistas el tri tradukoj. Ĉi tiuj verkoj uzas iomete pli malfacilajn vortojn kaj stilon ol la aliaj, sed ankoraŭ trafeflas por ĉiuj.

Do, ĉi tiu libro de nur 83 paĝoj (se ne enkalkuli bildojn aŭ titolajn paĝojn) taŭgas kiam oni volas iom da malpeza, mallonga legaĵo. Neniu el la enaj rakontoj okupas pli ol kvar paĝoj, do oni povas eklevi ĉi tiun libron, legi iom malmultajn minutojn, kaj mallevi la libron, leginte unu tutan verkon. Kun ĝiaj ĉarmaj bildoj kaj komprenebla stilo, ĝi estas ankaŭ bona elekto por malspertuloj.

Vivian Burns



### Charlotte Kohrs (1910-2002)

Charlotte Irwin Kohrs, fondinto de "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" kaj ĝia direktoro dum multaj jaroj, mortis je la 1-a de Julio 2002 ĉe sia hejmo en San-Diego, Kalifornio. Ŝi naskiĝis en 1910 en New Haven, Konektikuto sed pasigis plejparton de sia juna vivo en

Berkeley, Kalifornio kie ŝia patro, kiu scipovis dek unu lingvojn, estis Profesoro pri Matematiko en la Universitato de Kalifornio.

Charlotte tre interesiĝis pri la instruado de Esperanto al infanoj post la morto de sia edzo Leŭis en 1982. Ŝi verkis "malgrandajn librojn" por infanoj, inkluzive de *ABC en Esperanto*, *La Bela Planedo*, *Dek Demandoj*, *Dek Fabeloj*, *Flugu kun Petro*, *Ni Esploru la Mondon* kaj *Ni Parolu Esperante Kune*. Ŝi ankaŭ komponis dek du konversaciajn kantojn por lernantoj. Ili estis eldonataj en libreto *Kantu Esperante* kaj eldoniĝis ankaŭ kiel son-kasedo *Kantu Esperante Kun Janico kaj Johano*. Ŝi ankaŭ redaktis, eldonis, kaj distribuis tra la mondo dum kelkaj jaroj novajleterojn por "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo." Pro sia granda laboro por Esperanto oni nomis ŝin "Honora Membro" de la Esperanto-Ligo por

Norda Ameriko en 1999. Dum siaj lastaj jaroj, Charlotte ricevis multe da helpo pri Esperanto-aferoj de Jim Faughnan.

Dum du jaroj Charlotte studis ĉe Mills College, sed poste ŝi diplomigis ĉe la Universitato de Viskonsino. Iam ŝi revis pri kariero kiel koncerta pianisto, sed anstataŭe dum la Granda Depresio ŝi laboris kiel profesia socio-helpisto en Novjork-Urbo. Poste ŝi havis postenojn kiel instruisto de antaŭ-lernejaj infanoj kaj iliaj gepatroj, mez-lerneja instruisto (tiam ŝi kelkfoje instruis tiujn kiuj havas mensajn problemojn), kaj lerneja parol-terapiisto. Ŝi ofte uzis pupojn por instrui infanojn. Ŝi kreis specialan bild-vortan lingvon por helpi infanojn, kiuj havas leg-problemojn. Ŝi ankaŭ verkis libretojn kaj pup-teatraĵojn por ĉiuj infanoj.

Charlotte havis ses gefratojn, el

**Daŭrigo ĉe KOHRS, p. 11**

# La Verda Lingvo Ĥhis en Verda Montaro: NASK 2002

Lee Miller, Columbia, MO

Via vaganta raportisto (t.e., mi, Lee Miller) trovis tri partoprenintojn de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2002, kaj diskutis la spertojn kaj impresojn kiujn ili havis dum la tri semajnoj en la orienta parto de Usono.

**Lee:** Saluton, Don [Don Houpe, el Nord-Karolino]. Ĉu vi povus informi miajn legantojn kial precize vi decidis ĉeesti la NASK-kursaron ĉi-jare?

**Don:** Pro tio, ke preskaŭ ĉiun jaron estas intereso pri Esperanto ĉe NCSSM (The North Carolina School of Science and Mathematics, kie mi instruas la hispanan lingvon), mi decidis antaŭ 5 jaroj partopreni NASK-on en 2002 por plibonigi mian lingvokapablon. Kompreneble mi supozis ke mi vojaĝos al San-francisko, sed NASK-on 2002 oni okazigis en Vermonto kaj mi estis ege kontenta povi veturi tien per mia propra aŭto!

**Lee:** Kaj ĉu vi ŝatis tion, kion vi trovis en Vermonto?

**Don:** Mi tre ĝuis la kursaron, la manĝojn, la Vermontan veteron kaj la eŭtamiojn [angle "chipmunks"] kies hejmon ni kundividis tiujn tri semajnojn. Mi estas certa, ke mi bone progresis en la lingvo, ne nur pro la bonegaj kursoj gvidataj de elstaraj kaj amikemaj instruistoj — Roberto Resende el Brazilo, Ilona Koutny el Pollando, kaj Aleksandro Melnikov el Rusio, kune kun Bill Maxey el Usono — sed ankaŭ pro la multaj okazoj por Esperanto-konversacio ĉe la manĝoj, ĉe la vesperaj programoj kaj dum libera tempo. Estis mirinda sperto por mi konatiĝi kun aliaj Esperantistoj kaj mi ĝojas, ke mi ja renkontis novajn amikojn el ĉiu parto de la mondo! Tamen, mi volas progresi plu en Esperanto kaj tial mi esperas denove partopreni NASK-on en la estonteco.

**Lee:** Dankon, Don. Mi neniam forgesos tiun etan eŭtamion kiu ĉiumatene kuris en la dormejon kaj rekte al mia ĉambro! Kaj la eŭtamioj certe neniam forgesos VIN, kiu nutris ilin per la semoj de sunfloroj. Cetere mi scivolas: ĉu vi jam finlegis la novan eldonon de la PIV? . . . Saluton, Steĉjo! [Stevens Norvell, el Halifax, Nova Skotio] Ĉu vi povus iom priskribi la situacion de la ĉi-jara NASK? La unuan

fojon en la historio de la kursaro ĝi okazis ne en San-francisko!

**Steĉjo:** La "School for International Training" [SIT; vidu ĉe <http://www.sit.edu>] bonvenigis nin, kaj la ideo de Esperanto pli-malpli akordas kun la filozofio de la Lernejo. Tiu lernejo troviĝas en bela loko inter la verdaj montoj de la ŝtato Vermont (pripensu la signifon de tiu nomo! Ĝi devenas de la franca "verts monts", aŭ "verdaj montoj"). De la manĝeja teraso ĉe SIT oni superrigardas verdan valon kaj pretervidas, inter verdaj montoj, la riveron Connecticut en la fono. Vere ĝi estas taŭga kaj bela loko por studi nian verdan lingvon. Mi esperas, ke mi povos reveni venontsomere!

**Lee:** Kiom da homoj partoprenis la kursaron?

**Steĉjo:** Ni nombriĝis tridek: studentoj, instruistoj kaj gvidantoj. Ni venis el Usono, Kanado, Japanio, Brazilo, Francio, Rusio, Hungario, Pollando, Britio kaj Ganao. Krom Esperanto, ne estis alia lingvo por kunligi ĉiujn el ni. Estis kvar niveloj, sed niveleco ne disigis nin, ĉar multaj partoprenis en lecionoj de du niveloj. La plej juna partoprenanto havis 17 jarojn—eble li estos nova Edmond Privat! La plej maljuna . . . nu, eble ni ne diskutu tiun temon.

**Lee:** Aŭ eble ni simple diru ke ĉiuj estis junaj en koro, ĉu ne? Ĉu oni multe uzis la lingvon dum la tri semajnoj?

**Steĉjo:** Ni estis "la Esperantistoj" ĉe SIT kaj dum tri semajnoj ni parolis inter ni nur la verdan lingvon. Post la kelkaj unuaj tagoj ankaŭ la komencantoj. En la dormejoj, en la manĝejoj, en la klasĉambroj, en la koridoroj, ĉe la lerneja tereno, dum la vesperaj kulturaj programoj, dum la semajnfinaj ekskursoj en la urbeto Brattleboro kaj dum grimrado sur montoj, oni konstante aŭdis nian belsonan, vokalriĉan Esperanton. Dum la lecionoj oni strebis paroli ĝuste kaj precize, sed dum la paŭzoj oni foje nur malstreĉe babilis sen multe da pensado pri gramatiko. Esperanto, same kiel iu alia lingvo, estas ilo por komuniki, kaj ni ja sukcesoplene interkomunikiĝis per nia amata Esperanto. Multaj homoj en aliaj studprogramoj ĉe SIT atentis la lingvouzadon, kaj ofte pridemandis

nin pri la lingvo, la movado, niaj propraj kialoj por ĉeesti la kursaron, ktp. Ni havis multajn bonajn okazojn informi pri Esperanto en medio kie oni multe interesiĝas pri lingvoj kaj interkultura komunikado.

**Lee:** Jes, mi plene konsentas. Ĉiuj en tiu loko havis intereson, konsideris ke ni estas seriozaj pri nia "fako", kaj kelkaj eĉ komencis lerni Esperanton! Ĉu vi havas alian komenton?

**Steĉjo:** Eble la plej efika forto kiu unuigis nin estis *la NASKa Fasko*, tagjurnalo distribuita en la mateno de ĉiu labortago, plenplena de informoj, artikoloj, ŝercoj, bildoj, enigmoj, eseoj, kaj poemoj. Abundis, el ĉiuj niveloj, kontribuajoj al *la NASKa Fasko*, eĉ jen kaj jen elektitaj hejmtaskoj.

**Lee:** Dankon, Steĉjo. Kaj jen nia kolego Tim Westover [el Atlanto, Georgio]. Ĉu tio estas omaro sur via mano? Strange.

**Tim:** Vi pravas, Lee! Ja estas omaro, kiu taŭge nomiĝas "Omaro". Li fariĝis iuspeca maskoto de nia kursaro. Kiam li povis, li kontribuis al la bona etoso de niaj vesperaj kaj semajnfinaj programoj, kiuj okazis preskaŭ ĉiun tagon. Dum kelkaj programoj ni spertis la Esperantan kulturon rigardante Esperantajn filmojn aŭ priparolante gravajn Esperantajn librojn kaj revuojn. Sed en aliaj programoj, ni esploris la kulturojn de la NASKaj partoprenantoj. Okazis pola, hungara, brazila, rusa, ganaa, kaj japana vesperoj. Kvankam la usona kulturo ne havis apartan vesperan programon, la partoprenantoj ĉe NASK spertis tiun kulturon dum ekskursoj al la urbo Brattleboro, kiu situas nur kelkajn minutojn for de la SIT-kampuso. Brattleboro estas malgranda ĉarma urbo apud rivero kaj plenas de kafejoj, librovendejoj, kaj etaj butikoj, kiuj vendas lokajn produktajn. Kelkaj kursanoj ĉeestis "Fragan Vesperon", kies plej bona parto estis la freŝa fragkuko!

Ankaŭ estis eblecoj esplori la naturon, kiu ĉieas ĉirkaŭ Brattleboro. Granda grupo iris al ŝtata parko por piedmarŝi al bela akvofalo. Alian semajnfinaĵon, grupo faris boatar krozekskurson laŭ la rivero "Connecticut" dum kiu okazis spektaklo

de jaz-muziko. Se iu ne volis partopreni tiujn ekskursojn, almenaŭ tiu povis ĝui la belan pejzaĝon videblan de la SITA manĝejo.

**Lee:** Bele. Vi havis rolon pri la enretigo de NASK-informoj, ĉu ne?

**Tim:** Se vi volas trovi bildojn de niaj programoj kaj ekskursoj, aŭ de la SIT-kampuso, nepre vidu la NASKan retpaĝon. Estis mia respondeco dum la kursaro enretigi taŭgajn artikolojn de *La NASKa Fasko*, kaj mi aldonis fotojn kiujn faris la kursanoj kun ciferecaj fotiloj. Pasintaj NASK-kursaroj ankaŭ havas siajn retpaĝojn:

<http://www.medialabinc.net/nask/nask.htm> por NASK 2000

<http://www.literaturo.net/nask/> por NASK 2001

<http://www.literaturo.net/nask2002/> por NASK 2002

Kompare kun aliaj jaroj, vi vidas ke la ĉi-jara NASK, kvankam nove naskita en nova loko, ne malhavis buntajn vesperajn kaj semajnfinajn programojn!

**Lee:** Dankojn, karaj amikoj, pro la ege interesaj reagoj kaj raportoj pri NASK 2002! Ŝajnas al mi ke ĝi estis tute nova, sed ankaŭ tute bona sperto. Ĉu ni diru "Ĝis la venonta jaro en la verdaj montoj"?

## Kongreso de la 3 Kalifornioj

Je Sabato, 9-an de novembro 2002 okazos en la Universitata Teatro de la UABC de Mexicali - Meksiko — la *Dua Jarkongreso de la 3 Kalifornioj*; de la 9-a matene ĝis la 5-a vespere.

Vendrede la 8-an estos frateca kaj kunlabora kunsido kun usonanoj de la 6-a vespere ĝis la 10-a nokte.

Inter la elstaraj konferencistoj troviĝas Prof. Ronald Glossop, aŭtoro de la grava libro *Monda Federacio*, kiu parolos pri la Internacia Puntribunalo dum 2002 (9:30atm). Ankaŭ Profesorino de la UABC — Universitato Aŭtonoma de la Ŝtato Baja California — Nicole Diesbach, sociologo, prezentos la temon "La Norda Limo de Meksiko" (11:00 a.m.)

Je la 1:30 p.m. oni enkondukos aŭdvide la Internacian Lingvon Esperanto, lingvo kiu faciligas la interkomunikon kun almenaŭ 122 landoj. Tion faros Prof. Duncan Charters kun la helpo de la plej juna profesoro de Esperanto surtere: 12-jara

## FIVE MOST WANTED

by the Esperanto League

These volunteer tasks are on the lam. The League needs **your** help in apprehending them!

Task: *Talent Bank/Volunteers Committee.*

Match volunteers and projects through the Talent Bank.

Priority: 1. Time: 1-2 hours per week.

Permanent (English).

Task: *Publicity Committee: mass media.*

Produce and distribute press announcements.

Priority: 1. Time: 1-2 hours per week.

Permanent (English).

Task: *CO Archivist.*

Arrange and archive important historical documents in Central Office.

Priority: 2. Time: 1-2 hours per week.

Permanent (bilingual).

Task: *Constant Amusement Committee/Agent (KAKA).*

Make certain that the Movement is amusing and fun. May include running around naked. (This position can be anonymous.)

Priority: 2. Time: 1-2 hours per month.

Permanent (Bilingual).

Task: *Beer Poster Distributor.*

Distribute Beer Poster as advertising.

Priority: 3. Time: 1-2 hours per week.

One-time (English).

Check our website for more tasks that need a careful watch! You do **not** need to be an expert — but you do need enthusiasm! To help, contact David Wolff at: [dwolff@panix.com](mailto:dwolff@panix.com), (978) 264-0286, or 6 Durkee Road, Acton MA 01720.

## KOHRs: daŭrigo de p. 9

kiuj du (Elly kaj Richard) ankoraŭ vivas. Ŝi havis du gefilojn, Molly Kohrs McConnell (bibliotekisto pri libroj por infanoj) kaj Chris Kohrs (komputilisto); tri genepojn, Cathleen (kiu instruas infanojn pri la medio ĉe publika akvariejo), Paul (kiu studas iĝi psikologo), kaj Christopher (kiu studas iĝi geologo); kaj unu pranepo Tharyn (sesjara).

Charlotte amis infanojn, naturon, muzikon, kartludojn, kaj vortludojn. Ŝi estis tre optimisma persono kiu opiniis, ke unu persono povas plibonigi la socion kaj la mondon. Ŝi helpis multajn aliulojn, aparte infanojn, dum

sia vivo. Ŝiaj specialaj daŭraj donacoj al ni estas ŝiaj libretoj kaj kantoj por instrui Esperanton al infanoj tra la tuta mondo. Tiuj materialoj, kiujn ŝi produktis, haveblos ĉe la nova ret-paĝo por "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" <<http://members.directvinternet.com/~billmania/ICxLM.html>>, kaj post kelkaj semajnoj ĉe la nova adreso <<http://www.ICxLM.org>>.

Kontribuojn por honoro ŝin oni povas doni al la "Fonduso por Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" ĉe ELNA (P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530) aŭ al "Freedom from Hunger" (1644 DaVinci Ct., Davis CA 95617).

— Ronald Glossop, nova Direktoro de "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo".

Jesús Lopez García el Mexicali.

Honora bankedo okazos je la 7-a vespere la 9-an de Novembro. Partoprenos konferencanoj el Usono, Meksiko kaj Anglio. Dimanĉe la 10-an daŭros la kultura programo.

Inter kaj post la konferencoj okazos kantoj de Nueva Trova kaj baledo de Flamenko.

Estis invititaj la Ŝtatestro de Baja California; Gobernador Eugenio Elorduy Walther kaj la urbestro Presidente Municipal Lic. Jaime Rafael Diaz Ochoa.

Informis Ruben Feldman-Gonzalez

## To clean off our shelves ...

Every year ELNA gets stocks of various advertising fliers and the like. This year we received from UEA the very lovely six-fold color sheet advertising next year's World Esperanto Congress in the Swedish seaside city of Goteborg. If you would like to have a copy, as well as a registration form, please send a self-addressed envelope, with a first-class US postage stamp, to: ELNA/UK, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530.

## ĈIUJ AMIS FORTALEZAN!

kie okazis la 87a Universala Kongreso de Esperanto. Kiel mi skribis en *Esperanto USA*, mi ekamis Fortalezan dum mia stud-vizito tie en Novembro 2001. Nikola Rašić (Konstanta Kongresa Sekretario de UEA) same verkis pri sia amo de la urbo, la lokanoj tie, kaj la lando mem en Esperanto.

Kaj ne tro surprize mi ricevis multege da dank-leteroj de la partoprenantoj en miaj ekskursoj ĉirkaŭ la kongreso. Kiel skribis Boris Kolker,

“Ah, Fortalezo! Senfina bluverda oceano borderita de senfinaj plaĝoj el ora sablo. Palmoj kaj aliaj ekzotaj arboj. Niaj hoteloj sur laŭoceana promena strato. Temperamentaj, gajaj, amikemaj, bonvolemaj brazilanoj. ...

“En kiu Universala Kongreso gejunuloj konsistigas trionon de la partoprenantaro? ... Kie troveblas tiom da entuziasmaj kaj idealismaj esperantistoj? ... En kiu Esperanto-arango eblas spekti dum koncerto sprihaltigan kaj dancigan karnavalon? En kiu Universala Kongreso la publiko reagis al kantoj per aplaŭdegoj, aprobaj fajfoj kaj krioj, kvazaŭ en futbala matĉo? Kie gitarantaj kanzonistoj sukcesas kunkantigi milopan aŭskultantaron? En Fortalezo, ĉi-jara ĉefurbo de Esperanto-lando. Neforgesebla Fortalezo. Neforgesebla Brazilo.”

Amo ĉirkaŭis ankaŭ nian antaŭ-kongresan ekskurson al Amazonio, “Ekologio”. Partoprenis: Johano kaj Maria Bachrich, Alan kaj Jennifer Bishop (kiuj festis datrevenon de geedziĝo), Joel Brozovsky kaj Leonora Gonzales (kiuj enamigis kiel parto de la granda ronda familio Bonvolo), Giorgio kaj Margherita Denti, Jim kaj Alonda Droegge, Kep kaj Doroteo Enderby, Estela Garcia, Aldo kaj Daniela Grassini, Cristina Ghirlantini, Andreo Grzebowski, Kazuko Kikusima, Matilda Landau, Sally Lawton, Andrzej Malasewicz, Takako Matsuura, Iwona Mrozinska, Jose Luis Muñoz, Natalie Sera, Josi Shemer, Stefan Slak, Jon, Cassandra, kaj Laura Spelbring, Maria Suarez, Kunio kaj Masumi Suzuki kaj patrino Mari Nakayama, Robert Swenson, Leonora Torres (Felisa Bonvolo), Dori Wheeler, kaj Lusi Harmon.



BR 2-1L  
2002

*Joel Brozovsky – direktoro de la ELNA CO kaj Leonora ĝuis parton de sia post-geedziĝa ekskurso kun ni en Amazonio [foto dank' al Sally Lawton]*

Tri ELNA-anoj kuraĝe partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Pato Branco – kaj poste buse ekskursis ĝis Fortaleza: Aziz Diallo, Brian Hardwick, kaj Chuck Smith.

Aliaj Usonanoj partoprenis la UKon sed ne la ekskursojn: Joel Amis, Ghuzal Badamshina, Nahun Blonstein, Den Drown, Jane Edwards, Thomas Leong, Humphrey Tonkin (vic-prezidanto de UEA), Daniela Power, kaj Orlando Raolo, kiu reprezentis Usonon kiel komitatano A dum la komitat-kunsidoj.

En nia post-kongresa ekskurso 11-18 agosto “The Best of the Rest (of Brazil)” partoprenis 21 el la Amazonio-grupo plus Phil Dorcas, Rochelle Grossman, William Harmon, Heta Kesälä, Yung Myung Kim kaj edzino Hee Ja Jung, Boris kaj Esther Kolker, Anita Mills, Roland Thibault, Arnold Victor, kaj Steve Wagenseller. Entute reprezentigis 17 landoj en la ekskursoj. Ni estis vera Esperanto-komunumo! En niaj grupoj troviĝis eksprezidanto de UEA, ĉef-delegitoj el kelkaj landoj, aktivuloj, partneroj de aktivuloj, blinda paro kiuj bele ĝuis la ekskursojn – eĉ al Iguassu-Akvofalego. Unu paro festis datrevenon de geedziĝo, kaj Joel kaj Leonorita Brozovsky festis la geedziĝon. Intereso

variis, sed ni ĉiuj bone interrilatis kaj ĝuis la kongreson kaj la ekskursojn.

La venonta UK okazos en Göteborg, Svedio, en 2003. Se vi havas sugestojn por antaŭ- aŭ post- kongresoj kiujn vi dezirus partopreni, nepre tuj kontaktu Esperanto Vojaĝ-Servon.

Pli proksima kongreseto menciindas:

Dua kongreso de la 3 Kalifornioj

8-10 novembro – Meksikali, Meksikio

Se vi interesiĝas, EVS povas aranĝi mini-buson de la flughaveno en San Diego por partoprenantoj — nepre tuj anoncu intereson.

**ESPERANTO VOJAĜ-SERVO**  
6104 LaSalle Ave., Oakland CA 94611  
[510] 339-2001  
Plucy@berkeley4travel.com  
Use your Esperanto Travel Service

**Esperanto League for North America**  
**PO Box 1129**  
**El Cerrito CA 94530**

Non-Profit Org  
US POSTAGE  
**PAID**  
Leesburg FL  
Permit # 1040